

「蓑虫ノ説」跋

POSTPAROLO AL “KOMENTOJ PRI LA SAKVERMO”

Ŝlosinte pordon de herba ĥato, dum soleco mi versis unu hajkon pri sakvermo*. S-ro Sodou, mia amiko, profunde emociite, skribis ĉinan poemon kaj aldonis al ĝi eseon. La poemo estas brodita per brokaĵo, kaj la eseo sonas kiel ruliĝanta gemo. Kiam mi ellegis ĝin, ŝajnas, ke troviĝas en ĝi la esprima lerteco pri malligiĝo de bruoj, [kiun versis Qu Yuan en sia poemaro “Li Sao”], ankaŭ estas la noveco de Su Shi kaj la originaleco de Huan Shangu.

En la komenco de eseo estas dirite pri fila obeemo de Shun, la reĝo de la lando Yu, kaj de Ceng Can, la disĉiplo de Konfuceo. Tio signifas, ke oni devas ĉerpi moral-lecionon eĉ el la sakvermo. La admono, ke sentu senkapablecon kaj sentalentecon, signifas, ke oni vidu denove koron de Zhuang zi, nomata la Suda Floro. En la fino, la amoro al krizoĥroo signifas, ke oni detenu sin de lasciva pasio. Se ne respektinda avo Sodou, kiu do konus la koron de ĉi tiu vermo?

Oni diras: “Se oni kviete rigardas, ĉiuj realigas sin mem laŭ naturo en ordo”. [Cheng Mingdao, ĉina poeto en la epoko Song] Tiun frazon mi komprenas dank’ al ĉi tiu Sodou.

De longa tempo multaj ludantoj per plumoj, ravite de floroj, detruas la fruktojn, aŭ, ŝatante fruktojn, forgesas estetikon. En ĉi tiu eseo de s-ro Sodou oni povas kaj ami floron kaj ankaŭ manĝi ĝian frukton.

Estas iu pentristo, nomata Tyouko. Aŭdinte onidiron, li oferis pentri por la eseo. Blua koloro ja estas pala kaj kun subtila sento. Se rigardu ĝin, koncentrinte atenton, ŝajnas, ke la vermo kvazaŭ moviĝus, ke la folioj apenaŭ ne falus. Se aŭskultu kun atentaj oreloj, la vermo eligus voĉon kaj malvarmus blovanta vento en aŭtuno.

Nun sidante libere ĉe la kvieta fenestro, mi gustumas feliĉe la arton de ambaŭ sinjoroj. Tio, verŝajne, estas ja la honoro por la sakvermo.

Tousei en la banana ermitejo [1687]

YAMAGUTI SODOU

ESEO PRI SAKVERMO

Ho, sakvermo, sakvermo! Mi estas kortuŝita de ci je cia febla voĉo. Ci krietadas: “Ĉiĉijo-ĉiĉijo”. Ĉu tio signifas, ke ci tutanime estas fidela al patro? [“ĉiĉi” signifas “patro” en japana lingvo. –Rim.] Kial oni diras, ke ci estas ogrido? Kvankam tiel skribis s-ino Sei Shounagon, tamen ŝia plumo torditas. Eĉ se ci estus ogrido, sed ci, ŝajne, devus esti en la verma mondo la fidelulo Shun, la ĉina legenda reĝo, kiu estis filobeema eĉ al sia brutala patro Gu Sou.

Ho, sakvermo, sakvermo! Mi estas kortuŝita de ci je cia febla voĉeto kaj je sentaŭgeco. Griloj havas belan voĉon, tial do ili ĉirpas en la kaĝo, sopirante kampon. Silkraŭpoj ellasas fadenojn, tial do ili mortas ĉe servutuloj, trolaborante.

Ho, sakvermeto, sakvermeto! Mi estas kortuŝita de ci je cia sentaŭgeco kaj je kvieteco. Papilioj estas okupitaj ĉirkaŭ floroj, abeloj urĝatas tien kaj reen por la kolektado de mielo. Por kiu ili dolĉigas ĝin?

Ho, sakvermeto, sakvermeto! Mi estas kortuŝita de ci je cia malgrandeco de korpo. Nur unu guto de akvo estas sufiĉa por malsekigi cin, kaj nur unu folio por ci fariĝas cia loĝejo. Da fortegaj drakoj kaj serpantoj multe povas pereji fare de homoj. Ci, malgranda peco, estas pli bona ol ili.

Sakvermo, ho, sakvermo! Ci ŝajnas samkiel fiŝisto kun lineo. Sed fiŝisto ne forgesas pri fiŝo. Dum ventego, dum ondego, kiam li ne povas labori, li devas vendadi eĉ sian pluvmantelon por aĉeti vinon. Hokfiŝanta Tai Gongwang, kiu estis promociita de la reĝo Wen, estis kalumniita pro tio, kvazaŭ li hokis la reĝon. Zi Ling dum sia hokfiŝado por ripozo estis abrupte embarasita, alvokite de la reĝo Han.

Ho, sakvermeto, sakvermeto! Ci, ŝajne, malsekigis cian manikon per larmoj pro cia amo al krizohroino. Ci kaŝe ŝteliradis al ŝi, al insulo Tamino, ĉu ne? Neniu vivanto evitus ĉi tiun volupton. Serĉante voluptaĵon, birdoj suprenflugas kaj fiŝoj subnaĝas profunden. Souzyou Henzyou, la bonzo-poeto, ploregis, kaj lia mantelo trempigis per larmoj tial, kial li ne povis forgesi sian antaŭan edzinon.

Sakvermo, ho, sakvermo! Ci printempe movis koron ĉe famaj poetoj, Izumi Sikibu kaj Hujiwara Teika, alkroĉiĝante al saliko, aŭ adherinte al falinta ĉerizflorpetalo. Aŭtune ci imponis Zyakuren per cia voĉsono en blovanta sur lespedezo vento. Ĉu post frosta vento ci forĵetos la sakon, samkiel cikadoj, aŭ ci mem kaj korpon kaj ŝelon kune forlasos?

ANKAŬ PER VIRAJ LITEROJ ESTAS ALMETITA ANTIKVA VERSO

Sakvermo, ho, sakvermo! Ci jam falis en la fenestron.
Cia fadeno preskaŭ tranĉiĝas kaj nun finas strebado cia.
Ci similas al paguro je la formo,
Sed ci havas talenton nek por deprunti loĝejon, kiel la paguro,
Nek por konstrui sian neston, kiel araneo.
Ci vivas kun blanka rosero, bongusta je cia buŝo,
Ornamite per sako-vesto el verda musko,
Prenante sengene duŝon de pluvo,
Ŝvebante facilanime en aero laŭ vento.
Ho, korvoj ne bekmanĝu cin, knaboj ne kaptu cin en herbaro!
Ĉar ĉielo lasas cin vivi ermite,
Kaj mi trovas cin granda anakoreto.
Ci forlasas sakveston, tamen neniu scias, kie ci mortos.

{*Rim.

Unue Basyoo versis hajkon kun la temo de sakvermo en aŭtuno de 1687.

Venu aŭdi
La voĉeton de sakvermo
Al la herba ermitejo

[Minomusi no ne wo kiki ni ko yo kusa no io]

Kaj poste, alvokite per tiu hajko, Sodou vizitis Basyoon, kaj verkis eseon pri la sakvermo, kiel donaco al Basyoo. Post tio la pentristo Hanabusa Ittyou desegnis sakvermon, kaj Basyoo aldonis al ĝi sian prozon kaj la eseon de Sodou. Tiel do estis kompletigita unu volumo de Sakvermo.}